







G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN LONDONO

Kvankam la malfruigo de la vagonaro kiu veturadis tra Eŭropo kondukis nin al Londono sabate vespere post la "Interkora Vespero", ni ĝustatempe estis dimanĉe matene en la grandega salono de la "Royal Festival Hall" kie okazis la solena inaŭguro de la 56-a U.K. de Esperanto.

Antaŭ la 2100 partoprenantoj el pli ol 40 landoj, Prof.D-ro Ivo Lapenna malfermis la kongreson legante la bonvenan apartan leteron de la Lord-urbestro de Londono Sir Peter Studd, kiu ne povis ĉeesti, kaj donis la vorton al pluraj reprezentantoj de la diverslandaj registaroj, inter kiuj la Japana Ambasadoro persone alparolis la kongreson. Multaj el la registaraj reprezentantoj salutis esperantlingve. La Itala Ambassadejo salutis per letero.

Post diversaj muzikaj punktoj sekvis la salutoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj: por Italio salutis Prof-ino Catina Dazzini kiu substrekis ke la angla kulturo ricevis pere de esperanto vastan diskonigon. Sekvis festparolado de Prof.D-ro I. Lapenna. La "Espero" finigis la inaŭguran solenaĵon, kaj sekvis komuna lunĉo al kiu partoprenis la plimulto de la kongresanoj.

La kongresa programo estis tiel densa ke ni povas raporti nur por kelkaj plej gravaj eventoj: Dimanĉe posttagmeze je la 16-a horo en la Universitata Preĝejo de "Kristo-Reĝo" okazis la katolika Diservo. Kuncelebris 8 pastroj gvidataj de la Prezidanto de I.K.U.E. Pastro Ferdinando Longoni. Predikis majstre Pastro Thalmajer.

Je la 19-a horo en la sama salonego de "Royal Festival Hall" okazis la BRITA VESPERO. Lerte prezentis la fama Esperanto-Verkisto Reto Rossetti kaj kantis Sybil Michelow sub akompano de Franck Merrick; William Auld deklamis poezion de Skotlando, muzikis violonisto John Rešek akompanata de pianisto David Hill, kantis Kimra Virvoĉa Horo de Londono kaj Reto Rossetti mem elektis por la kongresanoj britajn spritaĵojn. La dua parto de la Brita Vespero daŭrigis per la prezentado de skotaj popolmuzikoj kaj popoldancoj fare de sakflutisto Bob Murphy kaj de la "Reĝa Skota Popoldanca Societo", de folkloraj kantoj de Margaret Hill akompanata de David Hill. Samideano Maurice Bale kun sia trombono sukcesis vere amuzigi la publikon. Fine amiko Nikolaj Rytjkov prezentis laŭ impresplena maniero kelkajn elĉerpajojn de la verkaro de W. Shakespeare.

Lundon matene denove densa programo: Inaŭguro de la Internacia Somera Universitato, sub la rektorado de Prof. H.L. Elvin, direktoro de la Instituto de Edukado en la Universitato de Londono. Sekvis, en la sama "Kolegia Teatro", la prelego de Prof. Lapenna. Unua ĝenerala kunveno de U.E.A., sub prezido de S-ro E.L.M. Wensing (dum kiu salutis ankaŭ D-ro Baeskaĵ nome de I.F.E.F.), kaj debato pri la temo "Neŭtraleco de UEA - ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata?". Posttagmeze je la 18-a horo la anstataŭanto de la Lord-urbestro akceptis kvanton da gekongresanoj en la "Haberdashers Hall".

Post la oficiala bankedo okazis en Lyceum la internacia balo. La estoso estis tre amika. Dum paŭzo, samideano Don Lord el Manĉestro distribuis nin per simpatia kabareta prezentado.

Mardon, la 3-an de aŭgusto, ni profitis viziti Londonon ĉar la kunvenoj estis tiel multnombraj ke ni ne sukcesis elekti inter ili.

Vespere je la 20-a horo en la Kolegia Teatro okazis la unua prezentado de "Mandragoro" de Nikolo Makiaveli, fare de la Bulgara Esperanto-Teatro, gvidata de Kiril Draĵev. Poste junulara balo en apuda salono.

Merkredon okazis en "FriendsHouse" la antaŭanoncita Forumo pri "La problemo de la lingva komunikado en la nuntempa mondo". Por la diskuto de tiu ĉi temo oni invitis reprezentantojn de gravaj organizaĵoj kiuj okupiĝas pri disvastigado de grandaj naciaj lingvoj: "British Council", "Alliance Française", "Moskva Universitato", "Goethe Instituto" kaj ankaŭ la Sciencaj Akademioj el Sovetunio kaj Ĉinio.

La kongresanoj sentis la gravecon de la problemo kaj venis amase. Antaŭ pli ol 1000 personoj S-ro Macmillan el British Council prezentis argumentojn por la angla lingvo kiel internacia. Respondis Prof. Lapenna, kiu prezentis en vigla kaj ofte humora maniero siajn proprajn spertojn pri lingvolernado. La kazon de la franca lingvo prezentis amiko Jean Thierry. Konvinkita esperantisto li limigis sian paroladon al informoj pri la disvastiĝo de la franca lingvo. En la diskuto partoprenis ankaŭ reprezentanto de Pola Radio Marius Dastych, kiu akcentis la fakton, ke oficialaj aŭtoritatoj en Pollando subtenas kaj alte taksas la Internacian Lingvon. Necesas strebi al simila subteno ankaŭ en aliaj landoj.

Je la 16-a horo okazis kunveno de I.L.E.I. sub prezido de S-ro Sonnabend kaj D-ro M. Dazzini. La tagordo konsistis el aprobo de la raporto de la estraro, de la kasisto, de la redaktoro de "Internacia Pedagogia Revuo" kaj el raporto pri la kunordigaj konferencoj kaj pri ILEI-Kongreso dum 1972-a en Sovetunio aŭ Hungario. Samtempe okazis kunveno de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, sub la prezido de Pastro Longoni. Raportis krom la prezidanto, la estraranoj S-ro Mudrak el Aŭstrio, Pastro Casanoves el Hispanujo kaj S-ro Vigar el Britujo.

Vespere ni ĝuis amikan interbabiladon kun kolego Barks kaj aliaj semideanoj, ekster la salono Zamenhof, kie okazis la prezento de la filmoj. Ĉar la salono estis plenplena kaj multaj gekongresanoj restis ekstere. La filmoj prezentitaj estis: Pri Oslo, pri la 55-a U.K. en Vieno, pri duobla Esperanta geedziĝo okazinta en Londono la 27-an de aŭgusto 1970-a inter Raif Hubert Markar Markarian kun Kimie Araŭa, kaj Herbert Emil Platt kun Barbara Mary Williams. Sekvis tre instrua kaj informa filmo "Renkonto kun F.I.A.T.". Tiu filmo, por kiu ni devas plej multe danki al geedzoj Grattapaglia, estas prezentinda en ĉiuj landoj. Ni volas utiligi la okazon por informi ĉi tie ke ĉiu kongresano ricevis, je alveno al la akceptejo, belan teknon kun orkolora surskribo kiun, omage, donacis la aŭtomobil-fabriko FIAT. En la teko troviĝis ankaŭ dokumentoj kaj prospektoj pri la produktaĵoj de tiu mondkonata firmo. La lasta, estis tre interesa kaj informa filmo pri Aŭstralio. Ĉiuj filmoj estis Esperante parolataj. Rimarkinde: la samaj filmoj, pro iliaj graveco kaj intereso, estis reprezentitaj la sekvan-tan vesperon.

Dum la kongresa semajno ĉiutage okazis rondvojaĝoj tra Londono, dufoje tage, per aŭtobusoj kun gvidantoj. Jaŭdon okazis kvin tuttagaj ekskursoj. Ni elektis tiun per aŭtobuso kaj ŝipeto al Windsor, kie ni tagmanĝis kune, kaj Hamton Court. En ambaŭ lokoj ni vizitis la famajn kastelojn.

Malgraŭ dumnokta kaj iom frumatena pluvo, dum la ekskursoj ni tamen ĝuis sufiĉan bonan kaj ofte sunplenan tagon. Je alveno al Windsor, dum la elŝi-piĝo ankaŭ pluvigis. Bonŝance ni elektis mallongan ekskurson ĉar reveninte sufiĉe frue ni povis ĝustatempe atingi la Kolegianteatron kie estis prezentita la mirinda "KULTURA VESPERO". Ĝi konsistis en du partoj: la unua, rolita majstre kaj emocie de la simpatiaj bulgaraj geedzoj Belka Beleva kaj Anani Anev, geartistoj de la Bulgara Nacia Teatro, prezentis elĉerpajon de la korespondado inter G.B.SAW kaj la fama aktorino Eliza Campbell. Ni povis sekvi sur la scenejo la evoluon de amikeco inter la irlanda granda verkisto kaj lia plej ŝatata "muzo". Dum la dua parto samideano Andrej Tomecki, pola kabaret-kanzonisto, verkisto, poeto kaj alie, prezentis la spektaklon: "Kaj tamen estas Varsovio" kaj polajn popolajn kantojn akompanante ilin gaje per danc-paŝoj, muziko kaj diapozitivoj.

Vendrede, denove densa programo da kongres-laboroj: matene, en salono Privat, la kontakt-kunveno de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio. Prezidis D-ro Bacskaj kaj S-ro Barks, ĉeestis s-ro F.W. Young, Diviziestro ĉe la Britaj Fervojoj en Stoke-on-Trent, verkinto de la interesa fakprelego. TRAFIKAJ PROBLEMOJ EN LA VENONTA JARDEKO. S-ro Young respondis afable al pluraj demandoj de la ĉeestantoj. S-ano Barks tradukis. Tuj poste Komitato de U.E.A. kunsidis en apuda salono.

Anstataŭ la anoncita kunveno, la Esperanto Ligo Filatelista, organizis viziton al la Brita Nacia Poŝtmuzeo, gvidata de S-ro J. Rousseau, kun klarigoj de la Direktoro de la Muzeo. Posttagmeze denove ni partoprenis la multnombrian publikan kunvenon de Internacia Ligo de E. Instruistoj.

Vespere ni ĝuis la lastan spektaklon en la salono de Friends House. La unua vespero estis Brita, tiu estis "Internacia": Kantis, belege, operaj kantistinoj kaj kantistoj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, en la unua parto, dum en la dua kantis kanzon-kantistoj de Italio (S-ro Mario Mazzoli), Britio, Bulgario, Nederlando kaj Pollando. Ĉiuj longe, varme aplaudataj.

Esperanto-flagoj ne estis videblaj antaŭ la kongresejo, kiel kutime, pro rigoraj universitataj leĝoj, kiuj malpermesas hisadon de iaj flagoj antaŭ la Universitato. Tamen estis tie kaj aliloke rimarkeblaj indikoj: La tabuloj "ESPERANTO KONGRESO" instalitaj pere de la aŭtomobilista klubo "R.A.C.", kaj la multegaj afiŝoj, kiuj Esperante bonvenigis la kongresanojn, en la subteraj fervoj-stacioj.

Nacilingvaj gazetoj, eĉ la plej gravaj, raportis pri la kongreso. Sur aparta tabulo apud la ĝiĉeto "Gazetara Servo" aperis la eltondaĵo de tiuj artikoloj kun traduko.

Pola Radio ĉiutage donis raporton pri la kongresaj okazintaĵoj pere de sia radio-raportisto s-ano Marius Dastych, kiu posttagmeze pere de la kablo de B.B.C. sendis sian raporton al Varsovio.

La okaza poŝtstampo estis donata dum la Kongreso nur al adresitaj poŝtaĵoj enĵetitaj en aŭtomat-maŝinon, kaj ne, kiel dum la aliaj kongresoj, fare de poŝtisto. Okazis multaj riproĉoj de E-filatelistoj, ankaŭ ĉar por bona kvalito de stampado oni devis aldoni $\frac{1}{2}$ -pencan poŝtmarkon.

Sabaton matene en Friends House la Solena Fermo de la Kongreso. La ĝenerala sekretario de UEA, S-ro Becker resumis la rezultojn de la kongreso, Prof-roj Waringhien kaj Bernard prezentis la rezultojn de la Belarta kaj Oratora konkursoj. Prof. Lapenna laŭtlegis la finan rezolucion, unuanime aprobita. La simbola transdono de la granda E-flago inter Londono kaj Portlando, la kanto de "La Espero" kaj la frapo de la martelo de Prof. Lapenna finis la 56-an Asizon de la Monda Esperantistaro.

Delvina kaj Germano GIMELLI

LUGANO -- LA URBO DE LA 24-a I.F.E.F.-KONGRESO -- VALORAS VIAN VIZITON

Pri la deveno de la urbo fakte malmulte estas konata. Tamen ĝi devas esti tre malnova, ĉar oni scias, ke la urbo jam estis garnizono de la roma imperio. En la 12-a kaj 13-a jarcentoj la urboj Como kaj Milano interbatalis por posedi la lokon. 1512 ĝi falis sub la suverenecon de la svisaj pra-kantonoj Uri, Schwyz kaj Unterwalden. Tiu regintoj provokis per ilia terura ekspluatado kaj subpremo plurajn ribelojn. Nur 1798 Lugano akiris plenan sendependecon kaj la civitanajn rajtojn. En la dua duono de la lasta jarcento Lugano komencis havi certan gravecon kiel merkata urbo. Per granda celtrafa aktiveco, bona zorgado por fremduloj kaj konstruado de necesaj instalaĵoj Lugano gajnis sian hodiaŭan karakteron kaj en internacia turismo pli kaj pli famiĝis.

Lugano (277 m.) estas la plej granda urbo de la respubliko Tiĉino. Hodiaŭ havas 22.000 enloĝantojn. Ekzistas fortoj, kaj ankaŭ certa neceseco, kiuj celas enkonduki la ĉirkaŭajn lokojn kaj tiamaniere formigi "Grand-Lugano" kun 35.000 enloĝantoj. Tiu lokoj fakte jam hodiaŭ tiel forte ligiĝis al la centro de Lugano, geografie, ekonomie kaj politike, ke fremdulo ne rimarkas la diversajn memstarajn komunumojn. Lugano estas konata kiel unu el la plej belaj svisaj urboj. Belege ĝi aspektas, kuŝanta en golfo de samnoma lago. La impresoj estas tiu de itala urbo kun tre vigla internacia trafiko. La belaj lagobordoj, enmeze de abunda subtropika vegetaĵo kun siaj apartaj belecoj kaj farboriĉeco (mimozoj, kamelioj, magnolioj, oleandroj, azaleoj, rododendroj), en la fono la altaj montoj, kaŭzis ke Luga-

no hodiaŭ estas unu el la plej konataj lokoj de internacia turismo. La urbo kuŝas ĉe gravaj internaciaj trafiklinioj kaj taŭgas kiel elirpunkto por ekskursoj en la tiĉina regiono kiel ankaŭ per norda Italio (ekzistas fakte pli ol 100 diversaj eblecoj). La milda klimato, la preskaŭ ĉiam klara ĉielo, la tuta atmosfero de vivoplena kaj vivegeja urbo donas al Lugano tute apartan stilon. Pensu nur al la "dolĉa nenien-farado". Kvankam laŭ-nombre malgranda urbo ĝi vivas nur per kaj per la fremduloj. 180 hoteloj kun 10.000 litoj ofertas al turistoj multajn eblecojn. La urbo mem havas preskaŭ 1200 geoficistojn, kiuj zorgas per la glata funkciado de ĉiuj servoj. Per tiu nombro de dungitoj la urbo Lugano fariĝas la plej granda entrepreno de la regiono. La jaraj en- kaj elspezoj, kiuj sumas 37 milionoj da svisaj frankoj, substrekas la gravecon de tiu ampleksa laboro farita por la bono de la urbo kaj fremduloj. Dum la plej lastaj jaroj Lugano surprizis kun tute nova aktiveco. Ĝi fariĝis financejo, hodiaŭ havas 48 financo-institutojn kun 2200 geoficistoj kaj jam okupas trian lokon de tiu branĉo en Svislando. Laŭsperte ambaŭ aktivecoj, turismo kaj financo-sektoro, bone akordiĝas kaj portis al la urbo ĝis nun ne konatan prosperon.

Artamikoj same kiel natur-admirantoj trovas sian plezuron en Lugano. Vizitindaĵoj abundas. Pinakoteko Villa Favorita enhavas multvalorajn arttrezorojn de la itala, flandra-nederlanda, hispana, franca kaj germana artskoloj de la mezepoko ĝis la 18-a jarcento. Ankaŭ la "Muzeo Civico" (Villa Ciani) en la urba ĝardeno meritas atenton pro siaj pentraĵoj de Tintoretto, tiĉinaj artistoj kaj lombardiaj majstroj. Ofte en tiu konstruaĵo okazas apartaj artaj aŭ kulturaj manifestacioj. Tipe por Lugano estas la malnova urbo kun siaj malaltaj arkadejoj, vizitinda la urbodomo, konstruita 1844 kaj ornamita per modernaj pentraĵoj kaj skulpturo. La baroka "Palazzo Riva". Fama estas la preĝejo "Santa Maria degli Angioli", konstruita 1499. Origine monaĥeja preĝejo, ĝi famiĝis pro la freskoj de lombardia majstro Bernardino Luini. Ne pretervidinda estas la katedralo "San Lorenzo", konstruita 1517 kun fasado en fruresanesca stilo. Pliaj preĝejoj menciindaj estas la barokstila "Madonna di Loreto" kaj "San Rocce" (16-a jarcento) kun freskoj de G.B. Discepoli el Lugano. Konata estas ankaŭ la verko de Vincenzo Vela "La Desolazione" (funebra virino) kiam oni povas admiri en la urba ĝardeno. Plian monumenton de Vela oni trovas sur Riva Giocendo Albertolli, la monumento de Svisa nacia heroo "Wilhelm Tell".

Por admiri la pozicion kaj aspekton de la urbo oni povas fari plej diversajn ekskursojn. Famaj estas la montoj San Salvatore kaj Monte Bré, ambaŭ staras kvazaŭ antaŭ la pordo de Lugano, aŭ kiel gardistoj flanke de la urbo. De la supro oni havas belegan elvidon. Ankaŭ ĉiuspecaj rondveturadoj sur la strang-forma lago ĉiam estas ŝatataj. En la proksimeco estas Monte Lema aŭ Monte Generoso, ambaŭ donas ne priskribeblan imagon de la pejzaĝo kaj ĉarma regiono. Dum la bela vetero kuŝas antaŭ vi la tuta ĉeno de la alpaĵ montoj. Pli ol 40 ekskurseblecoj ekzistas nur en la plej proksima regiono. Ni certe ne povas priskribi ĉiujn, do venu, vidu kaj admiru mem. Lugano valoras vian viziton.

Kurt GREUTERT

La urba Trafikoficejo Lugano eldonis belan, koloran, esperantlingvan prospekton. Ĝi disponigas la tutan eldonon al L.K.K. Mendoj de tiaj prospektoj povas turni sin rekte al la IKK-Sekretario, sed kiel eble aldoni Internacian Respondkuponon por kovri la afrankajn elspezojn.

Dum septembro okazos diversaj definitivaj IKK-decidoj por ebligi la presigon de aliĝiloj, kiuj devus esti forsendpretaj ĝis la fino de oktobro. Por pliaj informoj rilate la kongreso turnu vin al: 24-a Esperanto-Kongreso IFEF, Loka Kongresa Komitato Sekretario: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri CH-6512-GIUBIASCO (Svislando).

Skisemajno en Germanio

La 13-a Internacia Pervojista Esperanto-Skisemajno (IPES) okazos de la 5-a ĝis la 12-a de februaro 1972-a. Petu informojn kaj aliĝilojn kontraŭ respondkupono ĉe S-ino Elfriede KRUSE, D-6 FRANKFURT (Main) Schweiz str.104 GHE.